

Troaj signaj simpligoj okazigas komplikigojn en la esprimado la akuzativa funkcio

Claude Gacond, 210-a radioprelego, 1967.10.18 & 1967.10.21

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtongan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Georges Galichet en sia [*Eseo pri psikologia gramatiko*] *Essai de grammaire psychologique* demonstras plurfoje, ke la troaj signaj simpligoj aŭtomate okazigas komplikigojn en la esprimado. Kiam ekzemple unu sola vorto reprezentas plurajn gramatikajn funkciojn, oni devas krei gramatikajn leĝojn tute arbitrajn por povi distingi tiujn tamen absolute necesajn funkciojn.

A.- La homa pensado sin bazas sur kelkaj fundamentaj procesoj. Ĉiu lingvo respegulas tiujn procesojn. Kio ilin parte kaŝas, estas la komplikigoj, kiuj rezultas de arbitraj vortaj simpligoj.

Cl.- Zamenhof, kiu parolis lingvojn apartenantajn al pluraj lingvaj familioj, povis percepti tiujn fundamentajn lingvajn procesojn pli klare, ol multaj lingvistoj, kiuj fakte kapablas paroli nur unu aŭ du lingvojn apartenantajn al unu sola familio, kaj krome tre supraĵe konas la aliajn lingvojn.

A.- Li povis verki lingvon, en kiu tiuj fundamentaj lingvaj procesoj esprimiĝu kiel eble plej racie. En la simpligo de la gramatiko li ĉiam haltis, kiam la eksperimentado pruvis, ke plia simpligo kondukus al komplikigo aliloke.

Cl.- Hodiaŭ ni bildigos tiun zamenhofan sintenon per ekzameno de la funkcio akuzativo.

A.- Komparado de lingvoj montris al Zamenhof, ke la akuzativa funkcio esprimiĝas plurmaniere. Ĝia rolo estas distingi la objekton de la subjekto. Tio estas psikologia neceso, kiu rezultas de la homa pensado.

Cl.- Lingvoj por distingi la objekton de la subjekto metas markon antaŭ aŭ post la substantivo, aŭ antaŭ aŭ post la artikolo, kiu akompanas tiun substantivon. Tiu marko donas al tiuj lingvoj grandegan stilan flekseblecon.

A.- Zamenhof ne volis mem decidi, ĉu tiu akuzativa marko estas avantaĝo aŭ malavantaĝo. Ĝi estas fakto, kaj la lingvo internacia devas ĝin posedi. La vivo poste decidis, ĉu tiu marko devas resti, aŭ ĉu ĝi devas malaperi. Zamenhof do enkondukis en la lingvon internacian la akuzativan markon **n**, kiu aldoniĝas al la substantivo, kaj al la adjektivoj, kiam ili kvalifikas aŭ determinas akuzativigitan substantivon.

Cl.- Sed tiu unilatera solviĝo de la akuzativa problemo ne povis kontentigi observanton kia Zamenhof. Aliaj lingvoj esprimas la akuzativan funkcion per prepozicio aŭ postpozicio, tio estas vorteto, kiu estas metata antaŭ aŭ post la substantivo. Tiu metodo marki la akuzativon similas al la ĵus ekzamenita marko **n**. La diferenco estas, ke la marko **n** algluiĝas al substantivo, dum la prepozicio aŭ postpozicio estas apartaj vortoj memstaraj.

A.- Denove Zamenhof ne volis mem decidi, ĉu tiu akuzativa marko estas avantaĝa aŭ malavantaĝa. Ĝi estas fakto, kaj la lingvo internacia devas ĝin posedi. Tio kondukis Zamenhofon al la konstato: **prepozicio** estas egala al la akuzativa marko **n**.

Cl.- Do pro tiu leĝo ni ĉiam povas elekti inter du esprimoj. Oni povas diri ekzemple aŭ:

A.- *Ni atendas vin* ; *mi rigardas vin* ; *mi instruas matematikon*.

Cl.- aŭ:

A.- *Mi atendas je vi*; *mi rigardas al vi*; *mi instruas pri matematiko*.

Cl.- Sed la inverso estas ebla. Oni povas diri aŭ:

Troaj signaj simpligoj okazigas komplikigojn en la esprimado la akuzativa funkcio

Claude Gacond, 210-a radioprelego, 1967.10.18 & 1967.10.21

A.- *Mi veturas **al** Parizo. Je lundo mi venos. Kuri **al** en la ĝardeno.*

Cl.- aŭ :

A.- *Mi veturas Parizon. Lundo mi venos. Kuri en la ĝardenon.*

Cl.- En sia lingva observado Zamenhof rimarkis trian rimedon por distingi la objekton de la subjekto. Estas la vortordo. Loko estas arbitre signita al la akuzativa funkcio. La lingvoj, kiuj elektis tiun vojon, perdis sian flekseblecon, sed gajnis iun esprimiklarecon. Denove Zamenhof ne volis mem decidi, ĉu la loka akuzativo estas lingva progreso aŭ regreso.

A.- Pro tio esperanto havas ankaŭ lokan akuzativon. Tio permesas diri ekzemple :

Cl.- Mi admiras Zamenhof ; Paŭl kritikas Karl ; Henri Vatr  imitis Raymond Schwartz en sia libro *Specimene*.

A.- Se la loka akuzativo ne ekzistus en esperanto, tiuj propozicioj ne estus eblaj. Oni devus ĉiam aŭ uzi la akuzativan markon, aŭ prepozicion. Oni dirus :

Cl.- Mi admiras Zamenhofon. Paŭl kritikas Karlon ; Henri Vatr  imitis Raymondon Schwartz en sia libro *Specimene*.

A.- aŭ :

Cl.- Mi admiras al Zamenhof. Paŭl kritikas kontraŭ Karl; Henri Vatr  imitis je Raymond Schwartz en sia libro *Specimene*.

A.- Kiam en la akuzativa funkcio troviĝas geografia aŭ propra nomo, esperanto preferas la lokan akuzativon al la marka kaj prepozicia akuzativoj.

Cl.- Oni povus distingi la funkcion akuzativo per aliaj rimedoj. Ili estis vole forlasitaj de Zamenhof. Anstataŭ meti markon ĉe la akuzativo, lingvoj metas markon ĉe la nominativo. Sed fakte temas pri la sama fenomeno.

A.- Oni povas havis ankaŭ du radikojn, unu por la nominativo, alian por la akuzativo. La franca ekzemple havas la pronoman serion **je, tu, il, elle, nous, vous, ils, elles** por la nominativo kaj **me, te, le, la, nous, vous, les, les** por la akuzativo.

Cl.- Oni nomas tiun ŝanĝon fleksio. Zamenhof rifuzis tiun eblecon, ĉar esperanto ne estas fleksia lingvo, sed aglutina lingvo, kie la radikoj restas absolute senŝanĝaj.

A.- Kiel vi konstatis, nia lingvo estas eksterordinare riĉa, pro la sinteno de Zamenhof, kiu neniam volis decidi, kiam sin prezentis pluraj metodoj por distingi unu solan fundamentan lingvan proceson. Pro tio li ofte asertis, ke li ne estas kreinto de lingvo internacia, sed nur iniciatoro. Li lasis al la vivo la elekton inter pluraj esprimeblecoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andr e Gacond.  gis reaŭdo !

-oOo-